Christian Morgenstern,

# Por konsoli amikon pri lia am-aflikto

*tradukita de Willy Nüesch*

Ni devas ree renkontiĝi ĉiam
kaj suferadi unu per l' alia,
ĝis ĉion tion ĉi ni benos iam.

En tiu tago la sufer' foriĝos,
sufer' almenaŭ, kiun blindo teksis,
kaj kiu nin arbar-en-ŝtorme fleksis.

En novan celon ni kaj vivon tiam
kiel riveroj en la mar' kunfluos,
kaj plu nenia apartiĝ' nin skuos.

Finfine tiam la "...ne serĉas sian"
en niaj koroj kiel ver' sin ankros.
Kaj al ni forto kaj feliĉ' ne mankos.

*Traduko de la Germana poemo "Einen Freund über seinen Liebeskummer zu trösten" de* Christian Morgenstern *(Kristiano Matenstelo, ∗1871-05-06 – †1914-03-31) en Esperanton de* Willy Nüesch *(Etzelstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, ∗1927-05-09).*

*Arg-71-139 (2013-08-28 18:39:29)*

*La tradukinto Willy Nüesch (Etzelstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, telefono: +41-(0)31-302 66 56)donis al mi, Manfred Retzlaff, la permeson publikigi siajn poem-tradukojn en mia interreta poemkolekto „Argiope.bl0rg.net“. Li ankaŭ kontrolis tiun chi elpresaĵon kaj mi korektis tajperarojn laŭ liaj indikoj. Tiu ĉi lia traduko aperis en la literatura revuo "Fonto" n-ro 274 en Oktobro 2003.*

Christian Morgenstern,

# Einen Freund über seinen Liebeskummer zu trösten

Wir müssen immer wieder uns begegnen
und immer wieder durch einander leiden,
bis eines Tages wir das alles segnen.

An diesem Tage wird das Leiden weichen,
das Leiden wenigstens, das Blindheit zeugte,
das uns wie blinden Wald im Sturme beugte.

Dann werden wir in neues Ziel und Leben
wie Flüsse in ein Meer zusammenfließen,
und kein Getrenntsein wird uns mehr verdrießen.

Dann endlich wird das »... suchet nicht das Ihre«
Wahrheit geworden sein in unsern Seelen.
Und wie an Kraft wird's uns an Glück nicht fehlen.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* Christian Morgenstern *(Kristiano Matenstelo, ∗1871-05-06 – †1914-03-31).*

*Arg-71-138 (2004-02-01 11:34:56)*

*Die von Herrn Willy Nüesch verfasste Übersetzung ist in der internationalen Literaturzeitschrift "Fonto", Nr. 274 vom Oktober 2003, erschienen.*